

## LA ĈIELO EN UNU ĈAMBRO

Gino Paoli

Esperantigo: Emanuele Rovere (Manŭel)

Se vi estas kun mi,  
mia ĉambro ne plu havas vandojn sed arbojn,  
arbojn multenombrajn.  
Kiam vi estas apud mi,  
ĉi tiu griza plafon' min ne subpremas plu,  
mi vidas super ni l'ĉielon,  
dum tie ĉi ni restas forlasitaj  
kvazaŭ ekzistus plu nenio, nenio en mondo...

Ludas akordion',  
ŝajnas al mi orgen'  
vibranta por vi, por mi  
en la senlimec' de l'ĉielo,  
por vi kaj por mi en ĉiel.